

Venu Kaj Sekvu Min!

Thomas S. Monson

Dua Konsilanto de la Unua Prezidantaro, Julio 1988

Ĉe la enirejo de la Granda Sallaga Valo kvazaŭ gardisto staras monumento pri prezidanto Brigham Young [brigam jang]. La profeto montras suben al la valo, kaj sub la statuo legeblas liaj vortoj: "Jen estas la loko." Malantaŭ si li lasas malhavon, penon kaj la streĉadon de la longa marŝo tra sovaĝejo kaj prerio. Lia etendata brako montras al la valo kun multvalora promeso. La unua elmigrada taĉmento, kiun organizis kaj gvidis Brigham Young en la jaro 1847, estas deklarita de la historiistoj unu el la grandaj epokoj de la amerika historio. Kelkcentoj de la mormonaj pioniroj suferis pro malsano, malsato kaj sub la efikoj de la vetero. Multaj perdis la vivon. Kelkaj, kiuj ne posedis ĉaron kaj tirbestojn, piede marŝis la 2000 kilometrojn tra la prerioj kaj trans la montojn, ŝovante la havaĵon per manĉaroj. Ĉiu sesa el tiuj homoj survoje mortis. Por multaj la vojaĝo ne komenciĝis en Nauvoo [navu], Kirtland [kirtland], Far ŭest [farŭest] aŭ Nov-Jorko, sed en malproksima Anglujo, en Skotlando, en Skandinavio aŭ Germanujo. Iliaj etaj infanoj preskaŭ ne havis imagon pri la forta kredo, kiu instigis iliajn gepatrojn forlasi siajn parencojn kaj geamikojn, ĉiun komforton kaj sekurecon. Kelkaj infanoj certe demandis: "Panjo, kial ni forlasis nian hejmon? Kien ni iras?" "Venu, karuleto, ni iras al Ciono, al la urba de nia Dio!"

Konfido al Dio

Inter la sekura hejmo kaj la promeso pri Ciono estis la vasteco kaj danĝero de la oceano. Kiu povas rakonti pri la timoj, kiuj kaptis la korojn de la homoj dum tiu danĝera transveturo? Emociitaj per la mallaŭta suflorado de la Spirito kaj apogitaj per simpla sed konstanta kredo, ili fidis Dion kaj hisis la velojn, malantaŭ si la malnovan vivon, antaŭ si la novan. Sur iu el tiuj tro plenaj, el ligno konstruitaj velŝipoj troviĝis ankaŭ miaj prageavoj kun siaj infanoj kaj povra havaĵo. La ondoj estis altaj, la transveturo longa. La spaco estis malvasta. Unu el la malgrandaj knabinoj, Mary [meri], estis tre delikata infano, kaj zorgema patrino povis nur vidi dum ŝi malfortiĝas de tago al tago. Mary grave malsaniĝis. Ne ekzistis kliniko, ne kuracista recepto, estis nur la daŭra ruliĝado de la laca malnova ŝipo. Tagon post tago la zorgemaj gepatroj elrigardis al firma tero, sed firma tero ne lasis vidi sin. La eta Mary ne transvivis la penadon de la transveturo. Post kelkaj tagoj kun febro, tra vualo da larmoj ŝi forlasis pacoplene la vivon.

La familio kaj ŝiaj geamikoj dense staris sur la malferma ferdeko, dum la kapitano gvidis la Diservon kaj la korpo de la amata eta infano, envolvita en larmomalseka veltola sako, estis ĵetata en la furiozan oceanon. Ŝia patro, forta viro, konsolis la malgajan patrinon kaj ĉiam denove, dum larmoj sufokis lian voĉon, diris: "La Eternulo donis, kaj la Eternulo prenis; la nomo de la Eternulo estu benata." (Ijob 1:21) Ni revidos Nian Mary!"

La majesteco de Ciono

Tiaj scenoj ne estis maloftaj. De Nauvoo ĝis Sallaga Urbo turforme ordigitaj ŝtonoj markis la tombojn. Estis prezo, kiun pagis multaj pioniroj.

Lacaj bovoj malrapide trotis sian vojon, ĉaroradoj ĝemadis, kuraĝaj viroj penadis; niaj prauloj, inspiritaj de la kredo kaj pelataj de ŝtormoj, marŝis antaŭen. Ankaŭ ili havis sian nubon dumtage kaj fajran kolonon dumnokte.

Ofte ili kantis:

Venu, sanktuloj venu,
ne evitu penojn kaj turmentojn,
ĝoje migru vian padon.
Ĉu malglata kaj pena
la vojo aspektas hodiaŭ,
ĉiu tago alportas gracon al vi...
Ĉio bona, ĉio bona!
(Kantaro, N-ro 4.)

Tiuj pioniroj konsciis la vortojn de la Sinjoro: "Mia popolo estu provita, por ke ĝi estu preparita ricevi la majestecon, kiun mi havas por ĝi, nome la majestecon de Ciono."
(Doktrino kaj Interligoj 136:31)

Kiam la longa dolorplena vojaĝo alproksimiĝis al la fino, ĉiu koro estis plenplena de jubilado. Lacaj piedoj kaj elĉerpitaj korpoj ricevis novan forton. Sur la trivitaj paĝoj de pionira taglibro ni legas: "En humila preĝo kaj kun la koro plena je dankesprimo ni kliniĝis antaŭ la Ĉiopovulo kaj konsekris al Li tiun ĉi landon kiel loĝlokon por Lia popolo."

Alia pioniro memoras: "Nia hejmo - ununura ejo, kiun mi estis fosinta en montodeklivon - estis sen fenestroj. Ankaŭ pordo ne ekzistis. Mia patrino pendigis malnovan tukon antaŭ la enirejon. Dum la unua vintro tio estis nia pordo. Mia patrino diris, ke neniu reĝino, kiu enpaŝas sian palacon povas esti tiom fiera kaj tiom feliĉa, kiel ŝi estis pri sia loĝejo, kaj la bonfaroj de la Sinjoro, kiam ŝi enpaŝis la pretan kavernan loĝejon.

Provo, peno, streĉado kaj aflikto - rezolute, kuraĝe kaj kun la forta kredo al vivanta Dio ili kontraŭis al ĉio. La vortoj de ilia profeta gvidanto estis ilia devizo: "Kaj jen estu nia interligo: Ni volas vivi laŭ ĉiuj ordonoj de la Sinjoro." (Doktrino kaj Interligoj 136:4) Kiajn provojn ni havas hodiaŭ?

La tempo forgesigas, kaj ni forgesas danki al tiuj, kiuj iris tiun, de tomboj kaj larmoj signitan, dolorplenan vojon. Sed kio estas pri la provoj de nia tempo? Ĉu ni ne plu paŝu sur ŝtonplenaj vojoj, grimpu sur fenditajn montojn, transiru riverojn? Ĉu ni ne do urĝe bezonas la spiriton de pioniroj, kiu kondukas nin for de la danĝeroj, kiuj minacas nian socion?

Moralaj skaloj ĉiam pli malaltiĝas. Hodiaŭ troviĝas pli da homoj ol iam antaŭe en punejoj - neniam tiom da homoj havis malfacilaĵon. La krimeco suprenpuŝiĝas al ĉiam pli grandaj dimensioj. La honesteco de la homoj videble ĉiam pli malaltiĝas. Multaj rezignas pri eterna ĝojo pro la tiklo de la momento. Ni konkeras la kosmon, sed perdas la potencon super ni mem. Tiel ni perdas nian pacon. Ĉu ni ne iel povas havi la kuraĝon kaj fortan decidemon, per kiu distingiĝis la pioniroj de pli frua generacio? Ĉu ne ankoraŭ hodiaŭ vi kaj mi povas fari konkretan pioniran laboron? La vortaro difinas pioniron kiel homon, "kiu malfermas novajn vojojn sur difinita kampo". Kiom urĝe do hodiaŭ la mondo bezonas pionirojn!

La Grekoj kaj la Romanoj gajnis grandajn venkojn dum sia tempo de prospero, sed ilia triumfo finiĝis, kiam ili postulis tielnomitan liberecon - libereco senkonsidere al la rajtoj de aliaj. Ili volis komfortan vivon, sed sen labori por tio. Ili volis sekurecon, sed neniu faris ion por tio. Ĉe la fina ili perdis ĉion - sian liberecon, sian komfortan vivon kaj sian sekurecon. La saman ni povas observi hodiaŭ, kiam la homoj interesiĝas nur pri siaj egoistaj celoj. Aliaj, dum la serĉado al gvidado, lasas sin peli tien kaj reen: "Al kiu ni aŭskultu? Al kiu ni sekvu? Al kiu ni servu?" Kaj ĉiutempe Satano estas preta por prezenti falsajn gvidantojn kaj profetojn, kiuj kondukas nin suben, for de ĉio, kio estas honesta kaj bona.

Persiste pledu por la vero

Sed se ni havas orelojn, kiuj vere aŭdas, tiam ni memoras pri la vortoj de la Savinto, kiu diris: "Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi." (Johano 14:6) Estas Lia voĉo, al kiu ni aŭskultu, por ke ni ne falu en tenton sed persiste pledu por la vero.

Memoru ni pri tio: La nekontentiga sopirado de la animo ne estos trankviligata per la senfina serĉado al eksciteco, sensacio kaj malvirto. Malvirto neniam kondukas al virto. Malamo neniam generas amon, malkuraĝo neniam kuraĝon. Dubo ne inspiras kredon. Kvereloj neniam estas de la Sinjoro. Por kelkaj estas malfacile, elteni la mokon kaj la ofendajn rimarkojn de malsaĝaj homoj, kiuj primokas la ĉastecon, honestecon kaj la obeemon al la ordonoj de Dio. Aliaj estas firmaj kaj ĉerpas forton el la vivo de la justuloj, ties ekzemplo postefikas dum daŭro de jarcentoj. Kiam Noa ricevis la ordonon, konstrui arkeon, la malsaĝa popolo rigardi al la sennuba ĉielo kaj mokis - ĝis la pluvo venis.

Antaŭ jarcentoj en Ameriko homoj dubis pri la realeco de la Savinto kaj ties misio. Ili kontraŭdiris kaj estis malobeemaj, ĝis dum la tempo de Lia krucumado neestingebla fajro neniigis la urbon Zarahemla. La tero tremis, la grundo forglutis la urbon Moroniha, kaj la urbo Moroni sinkis en la akvon. La moko de la homoj, ilia malbenado kaj ilia peko dronis en premanta mallumo kaj en la silentado de la teruro. La vorto de Dio plenumiĝis.

Ĉu ĉiam kaj ĉiam denove ni devas lerni tiun malfacilan lecionon? La tempoj ŝanĝiĝas, sed la vereco restas. Se ni ne lernas el la spertoj de la pasinteco, ni estas kondamnitaj, ĉiam denove fari la samajn erarojn, kun ĉia al tio apartenanta aflikto, kun ĉiuj suferado kaj doloro. Ĉu ni ne estas sufiĉe prudentaj, aŭskulti al Li, al nia Sinjoro; tiu kiu konas la finon ekde la komenco kaj de kiu venas la plano de savo?

Ĉu ni ne povas sekvi la Princon de Paco, la Pioniron, kiu efektive pretigis la vojon por nia? Lia Dia plano nun povas savi de la Babilono de la peko, de la sinplaĉemo kaj de la eraro. Lia ekzemplo montras al ni la vojon. Kiam tento Lin alfrontis, Li evitis la kontakton. Kiam la mondo estis ofertata al Li, Li rifuzis. Kiam Li devis doni Sian vivon, Li donis ĝin.

"Venu, sekvu al mi!" diris la Savinto. Tial imitu Lian vivon, ĉar nur tiel vi ricevos la rekompencan de la propra filo de Dio... Ĉar tronoj, regnoj, amo, potenco kaj eterna ĝojo iam estos niaj, se ni obeas al Lia "Sekvu al mi!" en tiu ĉi surtera vivo. (Kantaro, N-ro 229)

Se nun ni rigardas antaŭen, ni decidu ebenigi la ĝustan vojon por aliaj, per tio, ke ni en amo kaj fidelaj en la kredo sekvu nian Sinjoron kaj Savinton Jesuon Kriston.

(Traduko de Karl-Heinz Sommer el Der Stern 11/1988 kaj uzata kun permeso de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj.)